

Geologio Internacia

estas periodaĵo aperanta sub aŭspicioj de GS-ISAE (Geologia Sekcio de Internacia Scienca Asocio Esperantista). Ĝi celas liveradi al geologoj valoran literaturon verkitan originale en Esperanto kaj garantii unuecan terminologion de la koncernaj geologiaj disciplinoj.

Prezentante post ĉiu esperantlingva originalaĵo koncizan resumon en la gepatra lingvo de l'aŭtoro, ĝi manifestas sian firman starpunkton trakti la etnolingvojn sendiskriminacie, t.s. sen preferi lingvojn "grandajn", sen subtaksi "malgrandajn".

La veran internaciecon de la faka revuo akcentas nelastavice la fakto, ke ĝi estas eldonata diverslande. Ĝis nun aperis jenaj volumoj:

- 1 (1968): red. *J. Kavka*; 196 p.; eldonis *Geoindustria, n.p. Praha*; Prago.
- 2 (1972): red. *J. Kavka*; 194 p.; eldonis *Geoindustria, n.p. Praha*; Prago.
- 3 (1976): red. *J. Kavka* kaj *S. Skompski*; 146 p.; eldonis *Instytut Geologiczny*; Varsovio.
- 4 (1982): red. *E. Dudich* kaj *S. Skompski*; 142 p.; eldonis *Instytut Geologiczny*; Varsovio.
- 5 (1984): red. *E. Dudich*; 256 p.; eldonis *Scienca Eldona Centro de Universala Esperanto-Asocio*; Budapeŝto.
- 6 (1987): red. *R.B. Baratov, J. Kavka, V.I. Kiselev*; 140 p.; eldonis *DONIS*, Eldonejo de Akademio de Sciencoj de Taĝika SSR; *Duŝanbe*.
- 7 (1987): red. *J. M. Mabesoone*; 96 p.; eldonis *Universidade Federal de Pernambuco* kaj *Associação Pernambucana de Esperanto*; Recife.

La 8-an volumon de GI intencas eldoni en 1990 *Academia Sinica*, Pekino, okaze de la 25-a jubileo de GS-ISAE.

Recenzo: Terminologia kurso

Jan Werner: Terminologia Kurso (Manlibro eldonita por la kurso okazigata de Esperanto-rondeto de la sindikata klubo en *Roudnice nad Labem* kaj de la scienca-teĥnika sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1986-09-1./5.). *Roudnice n. L.: Sdružený klub ROH*. 1986, 88 p. La scienc-teĥnika revolucio kaŭzas kvazaŭ eksplode evoluantan faklingvon en la diversaj branĉoj de la scienco kaj teĥniko. Ankaŭ en Esperanto la neceso de bonkvalita terminologia laboro estas senduba, kvankam la atingita nivelo de diversaj fakvortaroj kaj terminaroj ne povas kontentigi. Tro ofte verkantoj de terminaroj kredas, ke sufiĉas faka scio por produkti terminaron en Esperanto. Nu — oni certe tuj konsentos, ke krome necesas almenaŭ bona lingva scio en Esperanto, ankaŭ ne ĉiam certigita. Sed tro da terminfarantoj ignoras la fakton, ke ege gravas tria scio-kampo: oni devas koni la problemojn, principojn kaj metodojn de adekvata terminologia laboro. La fondinto de la moderna terminologio-scienco, *Eugen Wüster* (1898 - 1977) ja ankaŭ estis unu el la pioniroj de la esperantologio, kaj tamen liaj priterminologiaj verkoj estas tro nekonataj en la rondo de esperantaj terminologoj. Dum la lasta tempo replifortiĝis la klopodoj ne nur stimuli la terminologiajn aktivadojn sed, plej ĉefe, levi ilin sur pli altan nivelon kaj, utiligante ekzistantajn spertojn el la Esperanto-movado kaj aparte ankaŭ tiujn de la internacia neesperanta terminologia mondo (*ISO, Info-term, TermNet*). Aperis kelkaj materialoj i.a. de *Jan Werner* (Terminologiaj instigoj el *Bad Saarow*. En: Budapeŝta informilo, 14, n-roj 2-3/1986) kaj *Wera Dehler* (Terminologiaj principoj de Esperanto. En: *der esperantist*, 21, n-ro 132, 4/1985).

Trege grava paŝo en la direkto de plua kvalita ŝanĝo de terminologia laboro okazis per la "terminologia kurso", kiun okazigis la Scienca-Teĥnika Sek-